

INTERNI

estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 262

Februaro, 2008

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto

Stevens Norvell — Kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson

329 Poplar Drive

Dartmouth, Nova Scotia

KANADO B2W 4K8

bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:

Reni Porter

71 Ridge Valley Road


Halifax, Nova Scotia

KANADO B3P 2E5

Abona kosto por Kanado estas \$8, por Usono \$12, kaj por aliaj landoj estas \$20

☆☆


MIA NOVA ŜATOKUPO: SAVADO DE MALNOVAJ ROZOJ



Figuro 1: Moskorozo Laneii

Kio estas malnova rozo? Estas kelkaj difinoj, sed plej simple; roz-specio aŭ -vario unue vendita antaŭ almenaŭ jarcento. Alia inkludas rozojn ĝis la dua mondmilito, do Hibrida Mosk-rozojn, kaj la produktaĵojn de aŭstralia bredisto Alister Clark (plej bone konata pro Lorraine Lee, Black Boy, Sunny South.)

Ĉiuj rozoj originis en la norda hemisfero. Jam en la fruaj jaroj de aŭstraliaj kolonioj, S-ro Macarthur kaj aliaj alportis rozarbustojn, por provi forpeli hejmsopiron. Iu malkovris, ke se oni ŝovis la subon de branĉeto de rozo en terpomon, ĝi povis travivi longajn vojaĝojn. Oni ankoraŭ trovas malnovajn arbustojn kreskantajn senhelpe en tombejoj, apud vojoj, aŭ ĉirkaŭ



Figuro 2: aŭstralia rozo Lorraine Lee

domruinoj. La serĉado de malnovaj rozoj (en Texas nomata „rozŝtelado”), por ilin „savi” per stikado kaj plantado de idoj aliloke, estas kaj ŝatokupo kaj internacia movado. Speciale en or-minadaj regionoj, kaj antaŭaj havenoj de velŝipoj ekz. Bermudo, oni trovas multajn variojn kiuj aŭ perdis la nomon, aŭ ne plu troviĝas en Anglio, kies vintro ne taŭgas por Ter-rozoj.



Figuro 3: te-rozo M. Tillier



Figuro 4: Resovaĝintaj rozoj apud vojo en Adelaide Hills

Ĉu necesas ilin savi? Jes, kaj rapide; tro-netigemuloj forfosas ilin el tombejoj kaj ĝardenoj de detruotaj domoj, aŭ ŝpruc-venenas ilin apudvoje. La originalaj plantoj de kelkaj miaj trovitaĵoj jam malaperis. Greffitaj rozoj povas esti estingitaj per ŝosoj el la baztrunko. Alia danĝero estas la emo de ĝardenistoj, ĉiam deziri ion pli modernan, aŭ rozarbuston, kiu floras de printempo ĝis la komenco de vintro. La plej multaj roz-specioj, kaj „Malnovaj Eŭropaj” roz-varioj, floras nur printempe. Pli longa roz-florado alvenis al Eŭropo ĉefe per bredado kun rozoj el Ĉinio kaj poste Japanio, ekde la frua 19a jarcento. Ĉefe Te-rozoj floras dum la tuta jaro.

Ĉu savindaj? Jes ja. Multaj estas pli fortikaj ol modernaj rozoj, kaj bezonas malpli, aŭ preskaŭ neniom, da akvumado, ŝprucado, eltranĉado — miaspecaj rozoj! Multaj kapablas aŭ preferas kreski per la propraj radikoj, anstataŭ esti greffitaj; do la ĝardenisto ne riskas fremdajn ŝosojn el la baztrunko. La formoj de malnovaj rozoj estas tre diversaj; pluraj roz-bredistoj, ekzemple David Austin, nun provas kopii ilin, ĉar la sameco de Hibridaj Te-rozoj enuigas. Variado de petalkoloro estas neniel nova: Ĉinaj-rozoj (ekz. Mutabilis) malheliĝas dum ili pliaĝiĝas, kaj multaj Te-rozoj estas buntaj. Kaj la parfumo de malnovaj rozoj! Ege malmultaj malhavas, kompare al modernaj rozoj. La plej amataj estas Damask-rozoj, kiujn oni uzis por parfumoj kaj medicinoj jam de la romimperio epoko, kaj Hibridaj Eternaj Rozoj. Parfumo aŭ formo de malnova rozo memorigas onin pri la ĝardeno de la avino aŭ pentraĵoj el aliaj jarcentoj.



Figuro 5: alba-rozo Felicite Parmentier

Al nekonata vario kutime estas donata studnomo laŭ la unua loko, kie ĝi estis trovita, +/- iom da priskribo. Ekzemploj estas Montrose Tea ROR (renomita „malnova rozo”), kaj Octavius Weld ROR (laŭ la nomo sur la apuda tombo). Mi ofte sendas foton aŭ skanilo-bildon al roz-amikoj interrete, petante helpon pri nomoj.

Ŝosoj kreskas el radikoj apud kelkaj rozarbustoj, (Gallica-rozoj ofte tiel agas), kaj oni povas elfosi plantetojn sen difekti la originalan. Por savi aliajn mi provas stiki - planti tranĉetojn en la grundon en majo aŭ frua vintro; aŭ en ofte-akvumitajn ujojn alimonate. Nepras peti permeson de la posedanto, aŭ la zorganto de la tombo, kaj neniam elĉerpi aŭ forfosi la originalan planton. Ofte la posedanto scias iom



Figuro 6: Te-rozo Octavius Weld

pri la historio de la rozo, aŭ de la regiono; tiel oni aŭdas tre interesajn rakontojn.

Kie vidi arojn de malnovaj rozoj en Aŭstralio? Ĝenerale, en urbaj botanikaj ĝardenoj. En Nova Sudkimrio: Rookwood Tombejo havas, mirinde, 200 variojn nekonatajn aliloke; Bishop's Lodge ĉe Hay. En la ŝtato Viktorio; La Viktoria Provinca Roz-ĝardeno. En Kanbero (la Aŭstralio regurba teritorio): Ĝardenoj de la Malnova Parlamentejo. En la ŝtato Sudaŭstralio: Apud la Rivero Torrens; Mitcham kaj Blakiston Tombejoj, Carrick Hill. En la ŝtato Okcidentaŭstralio: Araluen, Pinjarra. Internacia Kongreso pri Heredaĵ-rozoj okazos ĉiun duan jaron ie en la mondo. Kion legi? Komence, la libron, *My World of Old Roses (Mia Mondo de Malnovaj Rozoj)* de Trevor Griffiths.

Retejoj:

www.helpmefind.com
www.rosarosam.com

www.heritagerosefoundation.org
www.vintagegardens.com

Mi daŭre vagas laŭ kamparaj vojetoj, kaj hantas tombejojn...

— Margaret Furness

INSULO DE ROZOJ

Dum mallonga tempo, Insulo de Rozoj estis mikronacio proksima al la itala marbordo.

La afero komenciĝis en 1964, kiam itala inĝeniero Giorgio Rosa ricevis permeson testi novan teĥnikon per la konstruo de granda platformo – 400 kvadrataj metroj laŭ granda – en la Adriato, 11 kilometrojn for de la itala marbordo. Ĉi tiun nenaturan insulon subtenis naŭ fortikaj kolonoj starantaj surmarplanke.

La 24-an de junio, 1968, la sendependeco de la insulo nenatura kiel memstara ŝtato deklariĝis. La evoluado de la platformo, kaj ĝiaj uzoj sciencaj kaj ripozaj, estas iomete konfuzaj kaj malklaraj, sed ŝajnas ke tie estis restoracio, noktoklubo, memoraĵvendejo kaj poŝtejo, kaj (eble) radiostacio kontraŭ itala leĝo. Ŝajnas ankaŭ, ke iu eta grupo akiris la posedon de la insulo de S-ro Rosa.

La suvereneco de la insulo formaliĝis per la stampado de novaj naciaj moneroj kaj poŝtmarkoj, kaj la montriĝo de nova flago. (La flago estis oranĝkolora, kun centra ŝildo blanka, enhavanta tri rozojn verdflorfoliajn kaj verdflortrunkajn.) La oficiala regnomo, „Insulo de la Rozoj”, estis en Esperanto por montri la internaciajn ideojn de la insulo. La insulo nomiĝis parte por S-ro Rosa.

Al la itala registaro, tamen, ne plaĉis la farado de ĉi tiu nova kontraŭitalleĝa regno. Oficialaj reprezentantoj registaraj alvenis kaj ekregis la insulon. Post mallonga tempo, kaj kontraŭ la volo de la posedantoj, la platformo estis oficiale detruita.

— el Vikipedio

RUĜA RUĜA ROZO

Am' estas kiel ruĝa roz',
 Naskita en juni'.
 Am' estas kiel melodi'
 Kun kiu vagas mi.

Ho, kiel bela estas vi,
 En koro plenas am';
 Mi amos vin ĝis en la mar'
 Sekiĝos akvon flam'.

Ĝis mar' sekiĝos, karulin'
 Mi ĉiam amos vin;
 Ĝis mont' degelos sub la sun',
 Ĝis estos mia viv'.

Feliĉa estu, amatin',
 Ne trafu vin malĝoj'!
 Mi ja revenos, amatin',
 Eĉ se estus longa voj' !

— Robert Burns

La poemon 'A Red, Red Rose' tradukis Aleksej Borodin
<http://www.ipernity.com/doc/36643/1626869>

MIA ROZETO

Maljunulo gastis dum vespermanĝo ĉe malnovaj geamikoj. Imponis lin kiel la amiko antaŭis ĉiun peton al sia edzino per karigaj kromnomoj kiel karulino, amatin', dolĉulino, floreto, ĉarmulin', mia rozeto, ktp. Ili jam geedziĝis antaŭ preskaŭ 60 jaroj kaj evidente ili ankoraŭ multe amis unu la alian.

Dum la edzino estis en la kuirejo, la gasto diris al sia amiko, „Estas kortuŝe kiel, post tiom da jaroj, vi ankoraŭ nomas vian edzinon per tiuj dorlotnomoj.”

La maljuna amiko hontis. „Mi devas konfesi,” li diris, „antaŭ dek jaroj mi forgesis ŝian nomon, kaj mi timegas demandi ŝin pri ĝi!”

